

ĈEHOSLOVAKA
ESPERANTO
REVUO

JARO XIII. NRO 3.

31. MARTO 1931.

LA **PROGRESO**



OFICIALA ORGANO DE ĈEHOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.--; fremdlando Kĉ 25.-- (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ŝparkaso Praha: N-ro 34.271.

LA REGISTARO DE LIECHTENSTEIN
DANKAS EN ESPERANTO
AL ĈEHOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA.

(VLÁDA KNÍŽ. LIECHTENŠTEINSKÉHO DĚKUJE NÁM V E S P E R A N T U.)

Regierung
des
Fürstentums Liechtenstein

Vaduz, am 12. marto 1931

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista
Sro Rud. Fromada ĝen. sekretario
Sochařská 333

Praha Praha

Estimata s-ro Ĝenerala Sekretario: -

La Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado en Ĝenevo sendis al mi raporton pri la propagando per Esperanto, organizita de vi je la okazo de apero de miaj poŝtkartoj oficialaj kun Esperanto-teksto. La fin-resultato montras diskonigon en 50 gazetoj de via respubliko. Per tio vi estas en la unua vico inter la landoj, kiuj kontribuis al la sukceso de ĉi tiu propagando.

Ĝi deziras peti vin, transdoni al la esperantistoj en via respubliko mian sinceran dankon pro tiu utila helpo. Mi esperas, ke ili bonvolos same en setonto doni al mi mian valoran subtenon.

Höfliche Regierung:

PŘEKLAD:

Mezinárodní ústřední výbor esperantského hnutí zaslal nám zprávu o propagaci, kterou jste esperantem podnikli po vydání našich oficiálních korespondenčních lístků s esperantským textem. Konečný výsledek vykazuje rozšíření v 50 časopisech vaší republiky. Tím jste v prvé

řadě mezi zeměmi, které přispěly k úspěchu této propagace.

Prosíme Vás, abyste odevzdali esperantistům ve vaší republice naše srdečné díky za tuto užitečnou pomoc. Doufáme, že stejně i příště nám poskytnou svoji cennou podporu.

Jaroslav Vrchlický:

BALADO PRI MONTO BLANĪK.

El Vilaĝanaj baladoj.

En vendredo Paska, dum Pasio-preĝo,
BlanĪk malfermiĝas laŭ mistera leĝo.
Tre malbone fartas, kiu ĝin eniras,
je reveno hejmen jarojn li sopiras;
kaj feliĉa estas, kiu post la jaro
la momenton trafas ĝuste sen eraro,
kiam rean fojon, dum Pasio-preĝo,
BlanĪk malfermiĝas laŭ mistera leĝo.

Pli malbone fartas, kies peza dormo
lacan vidon fermas en mistera formo,
li ekdormas tie, dormas eĉ jarcentojn,
vane li bedaŭras de l' avido tentojn.

Trista la momento! Jira vilaĝano
en vendredo Paska iras el kabano,
sed ne al preĝejo kun Pasio-sonoj,
al arbar' li celas. Tag' nemulte luma
kaj la arboj tristaj en malĝojo zuma.
Saĝa hom' por ĉiuj Jira la najbaro,
pli ol la preĝejo loĝas lin arbaro;
marŝas li, plu marŝas, sub la monto
haltas,

historioj avaj en la kapo saltas,
iom li ridetas. — Jen la monta muro,
sub piceoj densaj loĝas aperturo.
Jira ĝin eniras kapon balancante,
el preĝej' Pasio sonas al li kante.
Longa koridoro — kaj lumet' en fino,
kvazaŭ stelo blanka el la nuba sino.
Jira daŭre marŝas al steleto bona
kaj subite haltas en ĉambrego ŝtona.

Apud muroj staras bela vic' ĉevala,
rimenar' ektintas je ekip' metala,
ĉiu kapomovo aŭ piedoskuo
sonas koridore per obtuza bruo.
Apud ĉevalaro, fablo veron diris,
kavaliroj stare en mallum' spalis,
per mantel' kovritaj ili staras tie
kvazaŭ ilin venkus peza dorm' magie.
Ĉe l' piedoj brilas aroj batalilaj,
sur la kap' fajreras kaskoj stelobrilaj,
de l' arĝentaj ŝildoj brilas la surfaco,
kaŝus sin ĉevalo sub ilia spaco.
Glavoj ege grandaj, ponardegoj ŝetaj,
arkebuzoj pezaj, lancoj, batalpretaj
ĉie nur armiloj en elekt' varia.
Tiel staris orde la armeo Dia
en batalovicoj kaj en ord' kompleta,
por batalo preta, sed en song' sekreta.
Kaj en mez' de ĉio jen standardo hela,
sur ĝi sankta Václav kun aglin' fidela.

Antaŭ ol ĝin Jira en surpriz' komprenis
brufermiĝis roko, ĉar la tempo venis,
velkis son' Pasia en arbar' senhoma,
ete ĝi nur eĉas en rokar' fantoma,
kvazaŭ bird' pafita la flugilojn svingas,
batas al volbaĵo, batas kaj estingas.
Sed subite Jiran kaptas pezo svena
li eksidas, pensas: Jen moment' konvena
por ripozi iom en la tomb' katena.

Kaj li dormis longe.

Kiam li vekigis,
ree venis tempo: BlanĪk malfermiĝis.
Ĝin ja li ne sciis; li okulojn premas,
ĉirkaŭ si rigardas, time li ektremas;
apud muroj staras bela vic' ĉevala,
rimenar' ektintas je ekip' metala,
ĉiu kapomovo aŭ piedoskuo
sonas kiel iam per obtuza bruo.
Apud ĉevalaro kiel aro ombra
ĝis nun staras vico kavalira nombra,
per mantel' kovrita ĝis nun staras tie,
kvazaŭ ĝin okupus peza song' magie.
Apud la piedoj — ne plu bataliloj,
sed anstataŭ glavaj brilis nun fosiloj,
kaj anstataŭ ŝildoj kun surfac' rebrila
brillis tie nune granda vic' plugila,
lancoj kaj ponardegoj, ĉio nun ŝanĝita
je falĉil', pioĉo, pure reforĝita.
Super ĉio staris la standardo hela,
sur ĝi sankta Václav kun aglin' fidela
gaje flagris alte...

De l' Pasio voko
venis al ĉi tie, mortis ĉe la roko.

Hola, Jira, supren! se en lok' arbara
ne perdiĝi devas hejmen vojo klara.
Unu nur rigardo! — Ĉevalar' ekhenis,
pezospira Jira el la rok' elvenis.

Dio sola scias lian nunan aĝon.
Apud rivereto klinis li vizaĝon,
tremo lin ekskuas, ĉar en la spegulo
kap' vidiĝas ĝriza, kap' de maljunulo,
sur tempioj palaj sulko ĉe sulketoj,
kiel hom' leginta multe el sekretoj,
kiujn Di' malofte montras por apogo,
kiuj por la unuj estas sen allogo,
por aliaj ree homa nur mensogo.
Mirigita Jira venas al kabano,
ĝin li ne rekonas — nek lin vilaĝano.

Ĉie en la kampoj svarmis laborantoj,
super gaja lando sonis birdaj kantoj.

El la ĉefa trad. R. u. d. H. r. o. m. a. d. a.

Dr. Ĉestmír Parma:

EVOLUO DE LA ESPERANTA KAJ LA NOVĈEĤA LITERATUROJ.

(Kompara studaĵo.)

Tago de la libro estas fakte festo por rememori la naskiĝon de Zamenhof, sed laŭ propono de Baghy kaj en senco de la ideoj kaj deziroj de Zamenhof ĝi fariĝis festo de esperanta literaturo, nomita Tago de la libro. Ni havas du kaŭzojn por festi Tagon de la libro. Unue ĝi estas vere speciale esperantista, tiom esperantista, kiom kristnasko estas kristana, ĝia karaktero bazas je nia entuziasma amo al nia lingvo. Due ĝi estas unu el unuaj signoj de nia esperantista vivo. Kulturo kristaliĝanta ĉirkaŭ Esperanto kreas sociajn formojn, per kiuj ĝi montriĝas plej klare. Unu el ĝiaj solenaj sociaj kreitaĵoj estas Tago de la libro, kiu estas nepre komparebla al iuj festoj de ŝtatoj aŭ religioj. Ni tion ĉiam memoru kaj estimu nian Tagon de la libro.

Estas skeptikuloj pri „verda kulturo“, kiuj vidas en esperanto ne pli ol teknikaĵon, bonan por plifaciligi internaciajn rilatojn. Vere en la komenco de nia movado oni ne kuraĝis publike pretendi pli ol tio. Sed la naskiĝanta literaturo — kaj tio estis la unua de literaturo plenumita grava tasko — pruvis, ke la lingvo esperanto ne sole taŭgas kiel teknikaĵo, sed ke ekzistas ankaŭ volo ĝin uzi kiel vivantan lingvon, kiel evoluantan idiomon de evoluantaj ideoj — ideoj, kiuj estis komence pli sentataj ol racie formulitaj, sed kiuj iĝis kaj iĝas ĉiutage pli klaraj kaj celas liberigi homon el lia troa separateco kaj doni al li vidon pli vastan, supernacian.

Pro tio ĉiuj faraĵoj de la lingvo estas por ni eminente gravaj, precipe la literaturo.

Esperanta literaturo estas arkivo de evoluo de esperanto-ideo. Ni tiom scivolus la rapidecon de progresado de esperanta literaturo. Nun ekstaras demando: ĉu estas eble trovi leĝojn de evoluo de esperanta literaturo same kiel

oni serĉas leĝojn de la vivo el historioj de la nacioj. Certe tre malfacila tasko, sed ĉu ni ne povas trovi en historioj de naciaj literaturoj almenaŭ similaĵojn, kiuj iĝus nin kompreni evoluon de esperanto-literaturo el unuiga vidpunkto kaj fari deduktojn el la farita vojo pri vojo farota?

Tiurilate la lingvo kaj literaturo esperantaj staras izolate. La komencoj de naciaj literaturoj estas ege simplaj konforme al ege simpla idearo de la tiama nacia vivo. Infaneco popola speguliĝas en infaneco literatura. La posta malrapida evoluo kultura speguliĝas en ĉiam pli perfektaj literaturaĵoj. Kontraste al tio Zamenhof kreis perfektan lingvon kiu estu esprimilo de idearo de tre alia kultura nivelo. Kaj tamen ni povas kompari unu nacian literaturon al esperanta literaturo, nome la ĉeĥan. La ĉeĥa literaturo evoluis same kiel aliaj naciaj literaturoj. El simplaj unuopaj komencoj al ĉiam pli perfektaj kaj pli nombraj verkoj ĝis en humanisma epoko de Veleslavín (1545—1599) ĝi atingis sian tre altan staton. Sed poste okazis nacia debaklo, detruo, morto — por jarcentoj. Ĉeĥa lingvo tre degenere vivaciis, literaturo preskaŭ ne ekzistis.

Kiam poste la racionalisma epoko kaŭzis novan liberigan atmosferon en Eŭropo, estimon al scienco, kaj precipe individualismon personan kaj nacian, tiam en ĉeĥaj kronlandoj kelkaj homoj ekhavis malklaran ideon vekti mortantan nacion. En jaro 1809 Dobrovský eldonis „Ausführliche Lehrgebäude der böhmischen Sprache“, ĉeĥan gramatikon. — Antaŭ ol Zamenhof publike eklaboris, estis distre en kulturaj landoj homoj ligataj per neformulitaj homaraj ideoj sen propra esprimilo. Por ili Zamenhof eldonis sian unuan libron: esperantan gramatikon.

Kaj same kiel Zamenhof la esperantan ankaŭ Dobrovský verkis unuan novĉeĥan vortaron, Deutsch-böhmisches Wörterbuch (1821), kiu korespondas al Radikaro de Zamenhof. Kiel Zamenhof konstruis gramatikajn regulojn de esperanto surbaze de indo-eŭropaj lingvoj, tiel ankaŭ Dobrovský eklernis la ĝustan

nova-ĉefan vortfaradon surbaze de slavaj lingvoj, nome en la verko: Die Biegsamkeit der slav. Sprache (O tvorivosti slov. řeči). Analogio inter Zamenhof kaj Dobrovský estas vere trafa, ne sole rilate al la materialo, sed ankaŭ al la labora metodo.

Post eldono de verkoj de Dobrovský tute ne estis certe, ĉu la lingvo fakte novkreita estas kapabla vivi, estas taŭga esprimi lasttempajn ideojn. Dobrovský dubis pri tio, ne pro la lingvo, sed pro aliaj, precipe politikaj kaŭzoj. Ankaŭ Zamenhof en la unuaj jaroj post publikigo de sia unua libro ne estis certa, kian rolon lia lingvo okupos: ne pro la lingvo mem, sed pro ĝenerala spirito de l'homaro.

Kaj nun alvenas tre interesa periodo de pioniroj. Ili donas pruvon pri vera taŭgeco de la lingvo kaj precipe pri nepra volo ĝin ankaŭ uzi, ĝin viviĝi. En ĉefa literaturo nove aperis traduko de biblio de Procházka, unua ĉefa gazeto, malgrandaj originalaĵoj ege rememorigantaj — krom la unuaj Zamenhofaj tradukoj el Biblio — la unuajn verketojn esperantajn de niaj pleje idealistaj pioniroj. Poste aperis nov-ĉefe pli nombraj kaj pli valoraj libroj de Thám, Puchmajer, ambaŭ Nejedlý — same kiel niaj pioniraj verketoj faris progresojn. Sed ĉiuj tiuj pioniraj verkistoj — escepte Zamenhof — havis pli da entuziasmo ol da talento. Literatura gloro de esperantaj pioniroj estas kondiĉa: efemera laŭ formo, sed grandega kiel unua paŝo al la vivo de nia lingvo. Same pri la nov-ĉefa pionira literaturo.

Ankoraŭ dum la vivotempo de Dobrovský aperis tradukoj de Jungmann (1773-1847). Kiel Zamenhof ankaŭ Jungmann klopodis pravi taŭgecon de sia lingvo per modelaj tradukoj de tiamaj ĉefverkoj anglaj, francaj kaj germanaj. Hermann und Dorothea tradukis ili ambaŭ en siajn lingvojn. Jungmann ankaŭ eldonis krestomation „Slovesnost“, kiel Zamenhof eldonis „Fundamentan krestomation“.

Ni do vidas jenan mirindan laŭtemp paralelon de komencoj de esperanta kaj novtempa ĉefa literaturoj:

Gramatikaj verkoj de Dobrovský — gramatikaj verkoj de Zamenhof

Krestomatio kaj tradukoj de Jungmann — krestomatio kaj tradukoj de Zamenhof, diligenta verketado de ĉefaj pioniroj — samaĵo de esperantaj pioniroj. (Daŭrigo.)

POR KURSANOJ.

Kiam Vráz, ĉsl. esploristo, estis en Brazilio kaj Kristnasko venis, li volis montri al Brazilianoj, kiel Ĉeĥoj festas la kristnaskan vesperon. Li havigis arbeton, pendigis sukeraĵetojn kaj kiam la invititaj sinjoroj kaj sinjorinoj venis, li ekbruligis la kandeletojn sur la arbo. Sed unu kandelo, malbone edukita, renversigis sur la kurtenon, de tiu ekbrulis la mebloj kaj en momento la tuta domo estis en flamoj. Vráz rapide elkondukis la gastojn sur la kontraŭan trotuaron, kie unu el ili mirigita ekkriis: „Ĉe ĉiuj diabloj! Tiuj Ĉeĥoj scias ja festi la kristnaskon! Tion oni devas lasi al ili.“

Infanoj, ĉu vi senŝeligis viajn pomojn? — Jes, panjo. — Kaj kien vi metis la ŝelojn? — Tiujn ni ankaŭ manĝis.

Kial vi senĉese emfazas por la sporto? Niaj antaŭuloj ne konis la sporton! — Certe, sed ili ankaŭ ĉiuj mortis.

Ĉu tiu gasometro montras precize, kiom vi konsumis? — Tion mi ne scias, sed ĝi montras precize, kion mi devas pagi.

Kiel oni scias, malgrandaj knabinoj ne kapablas esti silentaj (la grandaj cetere ofte ankaŭ ne) Al tiaj apartenas ankaŭ malgranda Evo. La patro al ŝi severe ordonis, ke ŝi ne rajtas paroli ne estinte demandita. Tri minutojn la malgranda babilulino sukcesis silenti, poste ŝi diris: Paĉjo, ĉu mi estas jam demandita?

PER BALONO AL NORDA POLUSO

La libro pri Andrée kaj liaj kamaradoj.

411 p. 115 bildoj, 10 fotoj faritaj de Andrée mem kaj rivelitaj post 33 jaroj.

Unika libro de eksterordinara intereso.

Broŝ. 90.—, bind 112.— afr. — La libro baldaŭ fariĝos raraĵo, ĉar jam 2/3 disvenditaj.

BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA VII. SOCHAŘSKÁ 333.

NUMERO 35. - MARTO 1931.

AGADO DE ĈAE EN JARO 1930.

(Raporto por la XII. ĝenerala kunveno okazonta
19. IV. 1931.)

Pri la pasinta jaro prezentas raporton la komitato kiel tuto en formo kompilita de la prezidanto laŭ partaj raportoj de la komitatanoj. Ĉar ni raportis en la Bulteno tre detale pri la komitata agado sufiĉas ofte revoko al paĝoj de nia gazeto sen ripezo de la detaloj. La raporto tuŝas sole la farojn organizitajn aŭ rezultintajn iamaniere el iniciato de la Asocio, do ĝi ne estas kompleta raporto pri nia lando, sed leganto vidos, ke nia agado fakte tuŝas preskaŭ la tutan movadon, kaj ke malmulto havanta signifon ne pure lokan estis farita sen ni.

1. **Konsisto de la komitato.** En la lasta ĝenerala kunveno estis ĉiuj komitatanoj elektitaj laŭstatute unuan fojon, ĉar ĉiuj rezignis por ebleco de nova elekto. Iia nomaro estas publikigita sur p. 56-a de la Progreso. El la elektitoj ne akceptis la funkciojn sinjorinoj Šupichová kaj Salbabová pro malsano, sinjoro Ing. Berger pro principa malkontento kun la Asocia agado. Divido de la funkcioj okazis en la unua komitata kunveno (24. IV. 1930) jene: prez. Kamaryt, vicprez. Pitlík, ĝen. sekr. Hromada, I. sekretario Ginz, II. sekretario Tarantíková, kasisto Sklenčka. Sur vakantan lokon de la komitato estis vokita s-ro Slavík.

2. **Komitataj kunvenoj** okazis 8 el kiuj 1 prezidis ĉro Kamaryt, 7 dro Pitlík. Partopreno de la komitatanoj estis tre kontentiga, neniam okazis, ke ne ĉeestu laŭstatuta nombro decidpova. Ankaŭ la ekster-prahaj anoj plejparte vigle kunlaboris, de la prezidanto venis por ĉiu kunveno preparitaj raportoj kaj informoj. La protokoloj de la kunvenoj estis en kopioj sendataj preskaŭ ĉiam al la neĉeestintaj membroj kaj ĉiuj estis, (escepte kelkajn konfidencajn traktadojn) publikigitaj en la Bulteno, kio ebligis plenan informitecon de la anaro pri la komitata agado. La protokolojn verkadis komitatanoj Hromada, Ginz, Kamaryt, Tarantíková. Estus dezirinde, ke en la venonta jaro prenu la dua sekretario tiun laboron en

siajn manojn komplete kaj sensarĝigu la ceterajn funkciulojn de zorgo pri ĝi. La kunlaborado de ĉiuj komitatanoj estis tre kontentiga kaj aperigis reciprokan amikan estimon kaj helpemon.

3. **Membraj kunvenoj** okazis du, ambaŭ en Praha, raportis pri ili Bulteno sur paĝoj 54 kaj 98. Kvankam bone vizititaj kaj kun tre taŭga programo, ili ne sukcesis ĝisnun alfiri novajn kunlaborantojn.

4. **Administrado.** En tiu ĉi jaro fine efektiviĝis la longe dezirata malkoncentro de la laboro. Kreiĝis komisionoj por diversaj fakoj, kiuj efektive ne sole estris, sed plenumadis la laborojn. Funkciis komisionoj kun jena tasko kaj estro: Administrado de membroj (Sklenčka), Financaj aferoj (Sklenčka), Lerneaj aferoj (Kamaryt), Sciencistaj aferoj (Kamaryt), Gazetara servo (Ginz), Radio (Ginz), Turismo (Pitlík), Ekspozicia materialo kaj arkivaj dokumentoj (Sustr). Ĝenerale pritraktate la rezultoj de tiu aranĝo estas kontentigaj. Bedaŭrinde ĝis nun signifas ofte la estro de la komisiono ĝian kompletan laborpovon. Ekzemple al 20 leteroj, kiujn sendis estro de la lerneja komisiono al profesoroj-esperantistoj invitante ilin al promeso de kunlaborado venis eĉ ne unu respondo. Sed oni povas prave esperi, ke en la venonta jaro la nombro de la kunlaborantoj estos pli kontentiga. Scienca sekcio transformiĝis en la menciitan komisionon. Literatura sekcio dum pluraj jaroj jam ne funkciis, tial ni forlasis ĝin el la nomaro ĝis venos iu, reprenonta ĝian laboron. Tamen ni alvokis en Bulteno kaj la ĝenerala sekretario preparis kaj dissendis cirkuleron pri ĉeĥoslovaka entologio, kiu devus esti unua zorgo de reviviĝonta komisiono. Sumo de leteroj forsenditaj de la komitatanoj estas 380 sen leteroj de la kasisto kaj sen cirkuleroj kaj presaĵoj. Teknike multon helpis multobligiga aparato pruntita al ni de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Instituto, al kiu ni diras pro tio publikan dankon. La aparato estis en loĝejo de s-ro Slavík, kiu laboris per ĝi kaj krom ofta neta kopiado de gravaj leteroj faris ĉiujn eldonitajn cirkulerojn. La asocia skribmaŝino estis en loĝejo de komitatano Sustr.

5. **Ekspozicia materialo kaj arkivo** (komisionestro s-ro J. Sustr). Ekspozicia materialo, senpage pruntata por aranĝo de ekspozicioj, konsistas el kvin kolektoj kaj arego da materialo diversmaniere uzebla. La kolektaĵoj numero 2 ĝis 5 estas sendeblaj ĉien ajn, numero 1 estas preskaŭ ne transportebla pro sia abundeco. Ĝi similas arkivon de esp-o-presajoj kaj ne estas pruntebla ankaŭ pro multaj, nun ne plu haveblaj, unikajoj. La prunto de numeroj 2—5 estas senpaga por niaj membroj (krom pago de la sendkostoj). Ekster kolektoj ni posedas amason da materialo uzebla por ekspozicia celo sed ĝis nun ne ordiĝita. Dum la pasinta jaro la administranto kompletigadis la kvin ekzistantajn kolektojn. Ĉiuj estas en lia loĝejo krom la 3-a restinta ĝisnun en Ŭstí n. O. deponit kiam tiea klubo bezonis ĝin. Dum jaro 1930 neniu postulis prunto de la materialo, kvankam en la pasintaj jaroj venadis relative multaj iam eĉ urĝaj mendoj. — Ĉar la materialo okupas multan lokon en loĝejo de la administranto kaj la ŝranko, siatempe por ĝi pruntita de la Esperantista klubo en Praha, estas por tiu celo preskaŭ ne-uzebla pro sia netaŭgeco (ne estas ŝranko, sed malnovmoda tolajujo), la administranto petis la klubon, ke ĝi pruntu al ni pli taŭgan ujon kaj ricevis promeson, ke oni pruntos al ni ŝrankon bibliotekan, kiam la Klubo enmetos sian bibliotekon en novajn, jam menditajn, ŝrankojn. Ni dankas al la samideana klubo plej sincere kaj amike pro ĝia kompreno de niaj taskoj. La administranto ĝojas, ke en taŭgaj ujoj la administranto de la materialo estos multe pli facila. Ni uzas la okazon atentigi samideanojn pri ebleco uzi tiun gravan helpilon por ilia propaganda laboro. Same ni atentigas, ke estas je dispono de niaj membroj ekspozicia materialo ĉe Teritoria UEA-oficejo en Hradec Králové.

6. **Korespondantoj** (důvěrníci) de la Asocio. Ni komencis tiun ĉi jaron starigi reton de lokaj korespondantoj, kiuj nin reprezentus en sia loko, zorgus pri aliĝo de la membroj kaj informus nin pri ĉio, kio koncernas nian movadon, por ke ni povu kunigi ankaŭ malĝandajn faktojn kaj iniciatojn. Nia kasisto publikigis en Teritoria Tribuno alvokon, ke la UEA-delegitoj anoncu sin kiel niaj korespondantoj. En raportoj pri la komitataj kunvenoj ni plurfoje informis pri la afero kaj en la cirkulero sendita al ĉiuj kluboj en januaro 1931 unu el la demandoj koncernis la nomigon de la korespondanto. Malgraŭ tiu klopodo venis nemultaj proponoj. Al kasisto venis 3 aliĝoj, al ĝenerala

sekretario 22. Kvankam estas malmultaj, tamen ili signifas komencon de la estonta reto. Ni atentigas ankaŭ ĉe tiu okazo ĉiujn niajn membrojn pri utileco de tiu servo rimarkante, ke ili povos per malmulta laboro multon servi al nia organizo. Kiam estos pluaj, ni publikigos nomaron de la korespondantoj.

7. **Informado pri esperantistaj entreprenoj en nia lando.** Ni klopodis, ke enlanda kroniko en Bulteno estu kiom eble plej kompleta kaj fidinda. Ni atentigis plurfoje pri graveco de tiu afero en Progreso kaj en protokoloj pri komitataj kunvenoj, eĉ turnis nin por tiu celo per speciala cirkulero al ĉiuj kluboj. Kvankam la enhavo de la Bulteno tiurilate plikompletigis tamen estas dezirinda granda pliboniĝo en tiu ĉi afero. Estas kulpaj sole niaj propagandistoj netrovantaj ilian centron inda de rapida kaj ĝusta informado. En la pasinta jaro Kroniko en Bulteno raportis pri 19 lokoj. Ni esperas, ke la venonta jaro pligrandigos tiun ĉi nombron.

8. **Varbado de la membroj.** Malĝojigaj ciferoj, per kiuj finis la pasinta jaro, necesigis viglan agtadon. La kasisto dissendis al 300 adresoj cirkuleron subskribitan de la prezidanto kaj aldonis aliĝilon al cirkuleroj de la Teritoria UEA-oficejo. Regula kvitancado de la alvenintaj sumoj kaj ĝenerale pli vigla agado kontista kaj kasista aperigis venadon de novaj kaj revenadon de malnovaj membroj. Jam nun oni povas konstati pli grandan nombron de la membraro. Sed tiu movado estas nur en komenco, ĉar ni povis ekefektivigadi tiujn iniciatojn nur en septembro; tial aperos rezultatoj de tiu laboro pli videble nur en la jaro 1931. Pagoj por tiu ĉi jaro tion tre esperigas. Grava kaj longa malsano en familio de samideano Sklenĉka haltigis provizore evoluon de la nova aranĝo. Ni gratulas al ni, ke la danĝera situacio en la familio de nia ŝatata amiko kaj kunlaboranto ĉesis kaj ke la hejma bonfarto redonas lin kaj lian estimindan edzinon al nia rondo, kiu tiom ŝuldas al ilia servopreteco.

9. **Publika agado.** Depost la lasta ĝenerala kunveno aperis numeroj 29—34 de nia Bulteno en Progreso, redaktataj de ĝen. sekretario. Ili ampleksas entute 44 paĝojn, por kiuj ni pagis al eldonejo de Progreso sume 2500 Kč kaj la prezon de la 33-a numero (Kč 632.40). Tiun ĉi numeron ni eldonis en 3000 ekz. kiel eksterordinaran numeron de Progreso por eluzi malfaltan ĵurnalan afrankon. Relative regula aperado de Progreso depost oktobro 1930 multe helpis efikon de niaj informoj kaj ankoraŭ multe pli

helpos nun, kiam oni elĉerpinte la informojn malnovajn povos informi sen malfruiĝoj. — Ni mem eldonis slovaklingvan varbilon (2000 ekz.), flavan cirkuleron por kvitanci pagojn (2000 ekz.), ĉeĥlingvan aliĝilon (1400 ekz.). De la „Poŝtiko“ ni dissendis donace kaj vendate ĉ. 1000 ekzemplerojn. — Ciklostilitajn cirkulerojn ni eldonis kune 12, plej multajn el la Gazetara servo; kelkaj el ili estas plurpaĝaj tiel, ke la sumo de la paĝoj estas kune 23. La plej granda eldoncifero de unu cirkulero estis 400, la plej malgranda 20. La sumo de ĉiuj dissenditaj ekzempleroj estis 3007. Oni vidas, ke tiu amplekso preskaŭ atingas amplekson de la ciklostilitaj gazetetoj, kiujn eldonas kelkaj kluboj por sia membraro. Ankaŭ el tiu amplekso oni povas taksu kvanton de la komitata laboro, kvankam ĝi montras sole unu ĝian komponanton.

10. Kontakto kun ĉsl. oficialaj aŭtoritatoj. Krom la korespondado kaj persona intervenado ĉe ministerioj lerneja kaj eksterlanda ni ankoraŭ resumu: ĉe ministerio por internaj aferoj intervenis pri filmo dana, ĉe ministerio komerca pri filmo „Laŭdo de la patrujo“, ĉe ministerio fervoja pri esperantlingvaj turismaj eldonaĵoj vicprezidanto dro Pitlík. — Al urbestroj en Bratislava kaj Plzeň ni sendis dankleterojn pro iliaj decidoj (nomigo de la Zamenhof-strato, uzo de esp-o en oficiala gvidlibro).

11. Kontakto kun nia centra organizo. Post dujara paŭzo ni povis paĝi kotizon al Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj por jaroj 1928 kaj 1929 kaj restis tiel seninterrompe ĝiaj membroj. En kunvenoj de la ĝenerala estraro en Oxford reprezentis nin nia vicprezidanto dr. Pitlík; krom li ĉeestis la kongreson ankoraŭ komitatano Zemek. ICK-n ni daŭre informadis pri ĉiuj aferoj, kiuj ĝiniele koncernas, kaj klopodis konformigi niajn agadojn al la ĝenerala linio de la movado. Al ĝia iniciato ni dankas nian paŝon ĉe la ministerio lerneja kaj nune ni preparas paŝon tre gravan en alia sfero. ICK bone helpis nin ankaŭ per tio, ke ĝi regule gratuladis al ĉiuj publikaj aŭtoritatoj, kiuj iamaniere montris favoron al nia movado (fervoja ministerio plurfoje, urbestroj de Bratislava kaj Plzeň). La korespondado kun ICK, tre ampleksa dum tiu ĉi jaro, montris al ni tre konsciencan plenumadon de taskoj de nia propaganda centro. — Al bibliografia servo de UEA ni donacis 4 librojn mankantajn en ĝia biblioteko. — Al K R ni proponis, ke la societaj reprezentantoj

ne pagu en la universala kongreso kotizon; post diversaj klarigoj de ICK ni forprenis nian proponon rezervante al ni la rajton reveni al ĝi taŭgatempe. — Pri la „nov-organiza problemo“ sendis nia prezidanto en marto 1931 detalan leteron al ICK pri ideoj de la komitatanoj koncerne diversajn sugestojn. — Nia ĝenerala sekretario, ICK-ano de post ĝia fondo, estis post sia eliĝo nomita konsilanto de ICK kaj ricevis ĉe tiu okazo dankespriman leteron.

12. Kontakto kun la ceteraj naciaj societoj ne estis tiom ofta kiom kun la centro. Plej ofte ni kontaktis kun la Dana Societo (pro la filmo). Ni turnis nin senpere al kelkaj societoj pro la lerneja afero. Bedaŭrinda simptomo estas, ke ne ĉiam ni ricevis eĉ respondon. Ni atentigis pri tiu ĉi detalo ICK-n. — En 19. kongreso de germanaj esp-istoj en Dresden (7.—10. de julio 1930) parolis je nia nomo komitatano Dr. Fousek; krom li partoprenis la kongreson ankoraŭ komitatano Slavík. — Kun GEL ni rilatis amike kaj korespondis plurfoje pri la lerneja afero, en kiu ĝi promesis fari paralelajn paŝojn kun la niaj, kaj pri stariĝo de plano por difinitaj taskoj.

13. Esperanto en lernejoj. La ĝisnunaj permesoj instrui esp-on en publikaj lernejoj estis uzitaj pro diversaj kaŭzoj ne tro ofte. La statistika materialo mankas de post kiam dr. Kamaryt ĉesis esti sekretario de la Esperanta sekcio ĉe la Centra societo de ĉsl. profesoroj. — Ni turnis nin dum pasinta jaro al la ministerio de instruado kun petskriboj rekomendantaj provon por samtempa enkonduko de esp-o en pluraj ŝtatoj. Por apogi nian postulon ni petis la lokajn klubojn sendi al ministerio rezoluciojn por enkonduko de esp-o dum la lerneja reformo. Plenumis nian peton entute 27 kluboj nomitaj sur paĝoj 79 kaj 99. Nia iniciato okazis en plena interkonsento kun ICK kaj ĝi postulis oftan korespondadon kun ministerio lerneja kaj fremdlanda kaj diversmanieran informadon de la ĉefaj oficistoj, krom personaj intervenoj. Dr. Kamaryt trifoje parolis pri la afero kun ministro Dérer; krom la prezidanto intervenis ĉe diversaj ministeriaj funkcioj ankoraŭ dr. Pitlík kaj reg. konsilisto Eiselt. Nia iniciato vekis seriozan intereson, nia prezidanto ricevis plurajn respondajn leterojn de ministroj Dérer kaj Beneš kaj de kelkaj ĉefaj oficistoj. Tamen ĝi ne eliris ankoraŭ el stadio prepara kaj oni ne povas konjekti ion pri la fina rezultato. Certa tamen estas, ke neniam ankoraŭ devis nia lerneja administro tiom

pensi pri esp-o kiom nun. Simptomo certe tre grava estas, ke en la projekto de la nova instruplano por la reformotaj burĝaj lernejoj estas enmefita esp-o inter elekteblajn fakojn. Ankaŭ tio postulis personajn kaj korespondajn intervenojn de la prezidanto ĉe inspektoroj, prezidanto de la reforma komisiono kaj alie.

14. **Propagando per gazetoj** estis en la pasinta jaro denove organizita laŭplane de la restarigita Gazetara servo (estro s-ro O. Ginz). Ĝi dissendadis al siaj kunlaborantoj jam prespretajn artikoletojn pri esperanto por enmetadi ilin en ĵurnalojn kaj gazetojn. La rezultoj estis kontrolataj per eltranĉaĵoj ricevataj de la abonita Eltranĉaĵ-oficejo kaj de la kunlaborantoj. Tamen la ciferoj donitaj en la suba nomaro ne estas nombroj tute kompletaj, sed malgraŭ tio donas tre fidindan bildon pri la amplekso de la farita laboro. La gazeta servo mem sendas senpere siajn artikoletojn al 13 ĵurnaloj en Praha kaj al 34 ĵurnaloj ekster Praha en la urbojn, kie ĝi ne havas kunlaborantojn. Unufoje ĝi sendis represon el Progreso (paĝon 45). Tiu laboro estis komencita 28. V. 1930. Statistikon pri artikoletoj publikigitaj en la jaro 1930 faris s-ro Sedláček. Laŭ ĝi enhavis 65 gazetoj aperantaj en Praha 240 artikoletojn, 37 gazetoj aperantaj en cetera Bohemio 90 artikoletojn, 38 gazetoj aperantaj en Moravi-Silezio 202 artikoletojn, 7 gazetoj aperantaj en Slovakio kaj Subk. Rusio 28 artikoletojn; sume 147 gazetoj alportis 560 artikoletojn pri esperanto. Temas sole pri gazetoj en ĉeĥoslovaka lingvo. — Konstantajn rubrikojn pli malpli regulajn havis en la pasinta jaro: Národní Politika, Slovák, Ruch, Mladý svět, List říšského svazu učitelek, Rozkvět, Malý čtenář, Nový směr. En la jaro 1931 aliĝis al ili Slovičko (porinfana aldono de Česká Slovo), ĉesis Malý čtenář.

15. **Propagando en fakaj rondoj.** Ni sukcesis fari en du rotari-anaj kluboj prelegojn pri esp-o (Chrudim, Bratislava) kaj informis pri tio esp-istojn-rotarianojn en Britlando kaj Franclando. — Pri tiujara Internacia skolta tendaro ni informis la ĉsl. skoltan organizaĵon. — En instruistaj kaj porinfanaj gazetoj aperadis relative multaj informoj pri esp-o precipe dank'al f-no Šupichová. — Speciale por studentoj alflernejoj en Praha estis farita prelego de dr. Pitlík.

16. **Propagando fremdlanden.** Gazetara servo sukcesis publikigi artikoleon pri Liechtenstein

en 52 gazetoj, pro kio ni ricevis oficialan dankan leteron en esperanto de la Liechtensteina registaro. — Ni gratulis taŭgatempe al tiu ĉi registaro kaj al la Porfremdula asocio de tiu lando pro eldono de oficialaj poŝtkartoj ilustritaj kun esp-a teksto. — Gazetara servo kolektis por ekspozicio de gazetara organizita de Unuiĝo de jugoslavaj grafikistoj grandan kvanton de materialo kaj ricevis el Zagreb dankleteron enpresitan en P. sur p. 104. — Sekretario Ginz intervjuis sukcese por esp-o profesoron Samojlovič (vidu P. paĝon 105). — Plurfoje aperigis niaj anoj ĉeflingvaj tradukojn el esperantaj tradukoj (P. p. 83, 102) sed ne ĉiam ni ricevis informon, ĉu la fremdlandaj esp-istoj uzas tiun ĉi sukceson valoran por ili pli ol por ni.

17. **Dana filmo** meritas specialan alineon. Detala raporto estas sur p. 12 de la XIII. j. de Progreso. Oni vidas el ĝi, ke la filmon vidis 13.850 homoj en 7 urboj. La prezentaĵojn organizis s-ro O. Ginz.

18. **Parolanta filmo.** Sekretario O. Ginz daŭre persekutas diversajn aferojn tiurilatajn. Vicprez. Pitlík proponis al Disaŭdiga stacio en Praha prelegon pri lingva problemo en la son-filmo.

19. **Radio.** (Komision-estro O. Ginz.) Kurso de esp-o estas disaŭdigata el stacio Bratislava depost 1. X. 30 dufoje semajne dum 6 monatoj. Intereso de aŭskultantoj estas tre kontentiga. Instruas s-ro E. Wanitsek. Ĝi estas tria kurso disaŭdigata el ĉsl. sendstacioj. (La unua estis en j. 1927 el Brno de Bednář, la dua en j. 1928 el Praha de Eiselt.) Krom la kurso estis en jaro pasinta disaŭdigataj el Bratislava 4 prelegoj esperantlingvaj de s-ro Wanitsek pri „Slovaka literaturo“. La stacio de Praha disaŭdigis ĉeĥan paroladon de s-ro Ginz pri „Zamenhof kaj lia verko“. Mallongonda disaŭdigo en Praha provas pro nia iniciato disaŭdigon ankaŭ en esp-o. (Vidu paĝon 10, XIII.)

20. **Turismo** (komision-estro dr. Pitlík). Dum la universala kongreso en Oxford disdonis vicprezidanto dr. Pitlík esperantlingvajn propagandajn poŝtkartojn (Ĉsl. kasteloj) kaj broŝuron (Krkonosĉe), eldonitajn tiucele de la fervoja ministerio. Por la Krakova kongreso eldonis la sama ministerio ankaŭ laŭ iniciato de dr. Pitlík pluan esperantlingvan broŝuron „Vysoké Tatry“. Ĉsl. ministerio por komerco promesis laŭ propono de sia delegito ĉe prezentado de la Dana filmo doni al la eldonota propaganda sonfilmo „Laŭdo de la patrujo“ ankaŭ espe-

ranflingvajn tekstojn. La eldono de la menciitaj tri presajoj de la ministerio signifas gravan dokumenton pri la oficiala uzo de nia lingvo.

21. **Afero Biske.** Ni esperu, ke la aferoj kun sinjorino Biske finis per ŝia areŝtigo. Ni ripetu ankaŭ sur tiu ĉi loko, ke ŝiaj kursoj kaj preleĝoj estis ĉiam ŝia privata entrepreno kaj ke la oficialaj esp-istaj institucioj kaj personoj avertis pri ŝia agado la esperantistojn. UEA eligis ŝin en j. 1916, redakcio de Progreso avertis pri ŝi en novembro 1929. Pro stranga konduto kaj enigma karaktero ĉiuj gvidantaj personoj en la internacia kaj ĉeĥoslovaka movado malaprobadis ŝian agadon kaj propagandon. Tamen troviĝis kelkaj samideanoj, kiuj plejparte pro kompato, parte ankaŭ pro sia opozicia humoro koncerne gvidantajn personojn, aliĝis al ŝi kiel ŝiaj konvinkitaj partianoj kaj adorantoj. Ĉu konduto de sinjorino Biske apartenas en sferon patologiian aŭ alian decidus tribunalo de la juro. Ke malaperu morala malplaĉo restinta ĉe ni multaj, pri tio devas ni ĉiuj zorgi kaj amike helpi al tiuj, kiujn kaptis la eraro. Ankaŭ ni klopodu, ke homoj, unuan fojon interesitaj por nia afero, envenu en vicojn de la regule organizitaj esp-istoj.

22. **Sciencaj aferoj** (komision-estro Kamaryt). Informon pri organizo de ĉsl. komercaj tribunaloj sendis al Advokata societo en Antwerpen dr. Fousek. Belgan asocion por propraj ĝardenetoj informis pri teorio kaj entrepreno de universitata profesoro Stan. Růžička dr. Kamaryt. Al Dana Andersen-muzeo helpadis en kompletigo de bibliografiaj informoj pri la Andersenaj tradukoj O. Ginz. Al H. C. Spiegel en Berlin ni proponis nian kunlaboradon por sciencaj resumoj sekvante lian alvokon en „Esperanto“ kaj niajn klopodojn antaŭ kelkaj jaroj. — Ni daŭre funkciis kiel kolektantoj de kotizoj por la I. Scienca A.

Praha, 25. Marto 1931.

Komitato de ĈAE:

Dr. St. Kamaryt, Rud. Hromáda,
prezidanto. ĝen. sekretario.

FINANCA RAPORTO PRI 1930.
XI. administra jaro de ĈAE.

Ferma bilanco:

	Aktivoj Kč	Pasivoj Kč
Mono en la kaso	191.70	
Mono en la Poŝta Sparkaso Praha	749.55	
Mono en deponlibreto de Zložna peněžních úředníků	5.782.75	
Inventario	730.—	
Disvendotaĵoj	949.45	
Diversaj Debitoroj-Kreditoroj .	4.273.55	2.979.50
Kotizoj pagitaj dum 1930 por 1931		1.888.—
Asocia kapitalo		7.809.50
	<u>12.677.—</u>	<u>12.677.—</u>

Bilancia perdo-gajno:

Mebraj kotizoj	2.790.—
Disvenditaĵoj	16.33
Administraj elspezoj	3.479.50
Elspezoj de propagando	944.40
Diversaj en- & elspezoj	751.20
	<u>5.175.10</u>
Jara perdo	895.47
	<u>5.175.10</u>

Asocia kapitalo:

Stato 1. Januaro 1930	Kč 9.204.97
Revivigo de la fondaĵo por kandidatoj	Kč 500.—
	Kč 8.704.97
Jara perdo	Kč 895.47
Stato 31. Decembro 1930	Kč <u>7.809.50</u>

Hradec Králové, la 31. Decembro 1930.

Otto Skleněka, kasisto.

Elokventaj ciferoj pri la membraro de ĈAE

En la membro-libro troviĝas en fino de 1930 2381 diversaj nomoj de la personoj, kiuj estis aŭ estas membroj de ĈAE; el ili 276 pagis dum 1930 354 kotizojn por jaroj:

1926	1		Kč 18.—
1928	4	po 16	Kč 64.—
1929	55	po 16	880.—
	2	po 20	40.—
	59	2 po 8	16.—
			Kč 936.—
1930	157	po 16	2.512.—
	4	po 20	80.—
	1		18.—
	1		17.—
	1		12.—
	6	po 8	48.—
	1		7.—
	172	1	4.—
			Kč 2.698.—
	236		Kč 3.716.—
1931	117	po 16	Kč 1.872.—
1932	1		Kč 16.—
	354		Kč 5.604.—

El miloj da ĉeĥoslovakaj esperantistoj nur 276 plenumis sian kotizan devon. Por 1930 pagis 172 membroj; alkalkulante la 3 membrojn Dumvivajn

Prihlásil jste se do Svazu?

ni venas al treege malgrasa cifero de nuraj 175 anoj en 1930.

Mi trovas utile citi ĉi tie la nomojn de tiuj el niaj membroj, kiuj fidele de la fondiĝo de nia Asocio regule pagas ĉiujare sian kotizon. Estu permesite citi nur nomojn, sen iu ajn titolo:

Ladislav Brambora, Praha
 Josef Brich, Praha
 František Dejmek, Praha
 Josef Dubný, Orlová
 Josef Eiselt, Praha
 Dr. Josef Fousek, Praha
 Josef Friedrich, Košice
 Otto Ginz, Praha
 Antonie Grossmannová, Bohdaneč
 Anna Hodíková, Praha
 Rudolf Hromada, Praha
 Karel Juna, Hradec Králové
 Dr. Stanislav Kamaryt, Bratislava
 Marie Kopecká, Hradec Králové
 Antonín Kudela, Olomouc
 H. K. Bouška, Praha
 Miloš Lukáš, Trnava
 Matylda Minářková-Podlucká, Bystřice p. Hostýnem
 Anna Morávková-Dvořáková, Pardubice
 Bohumír Podzimek, Dědov
 Josef Purný, Hradec Králové II.
 Otto Skleněčka, Hradec Králové
 Božena Skleněčková, Hradec Králové
 Miloslav Schmidt, Praha
 Josef Vávrovský, Praha
 Rudolf Waldstein, Praha
 Bedřich Weiner, Praha
 Mořic Weisskopf, Praha

Krom tiuj ĉi 28 fideluloj estas en la membro-libro multaj, kiuj ankaŭ apartenas inter la plej malnovaj, t. e. kiuj aliĝis en 1920, sed kiuj por unu, du aŭ tri jaroj ne pagis sian kotizon al la asocio. Ĉu ili ne volus egaligi tiun malnovan ŝuldon kaj tiel helpi la asocion? Mi tre ŝatus povi doni pli longan duan liston de la plej fidelaj inter ni.

Hradec Králové, la 31. Decembro 1930.

Otto Skleněčka, kasisto.

Uĉebnice.

Dr. A. Šilha: Uĉebnice esperanta. Schválena min. školství. Bohatá souvislou četbou, vhodnou pro otázky a odpovědi	10.60
H. K. Bouška: Škola esperanta. Ob-sáhla, hojně příkladů a jazyk. pojednání	31.—
Žďárský—Procházka: Uĉebnice esperanta	21.—
J. Bednář: Esperanto	13.—
H. K. Bouška: Krátký kurs esperanta	—60
Zamenhof—Škarvan: Slovenská uĉebnice esperanta	10.60

VII. KOMITATA KUNVENO DE ĈAE

okazis jaŭde la 26. Marto 1931 en Praha, kafejo Union. Ĉeestis: S-roj Brambora, Ginz, S-ino Herzigová, S-roj Hromada, Dr. Pitlík, Slavík, Sustr, F-ino Tarantíková. Kiel gasto venis al la fino de la kunveno prof. Jukl el Bratislava, invitita. — Senkulpigis sin Dr. Fousek, S-ino Grauerová, S-ro Janda Jos. kaj Zemek, leterojn sendis Dr. Kamaryt, S-ro Skleněčka. — Komenco 20.30, fino 23.30.

El la aferoj traktitaj ni publikigas la jenajn:

Partoprenu en la jarkunveno de ĈAE!

Ni memorigas al niaj membroj, ke la ĝenerala kunveno okazas en Praha dimanĉe la 19. Aprilo 1931 (kafejo Urban). En ĉi tiu n-ro ni publikigas la raporton pri agado de ĈAE en 1930 en espero, ke la membroj zorge ĝin traktados kaj uzos la avantaĝon de frutempa publikigo por prepari siajn rimarkojn. Se iu membro, malgraŭ nia espero, ne povos veni, li la rimarkojn sendu.

Ĉiu membro ricevos poŝte rajtigilon por povi sin reprezentigi per alia membro ĉeestonta, se li mem ne partoprenos persone.

Venu la 28. Junio al Esperanto-Tago en Pardubice!

Ni nun traktas kun Esperantista Klubo en Pardubice pri la programo, kiu verŝajne estos amuza sabate vespere kaj dimanĉe posttagmeze, kaj labora dimanĉe matene. Ni havas esperon ricevi senpage lokon por ekspozicio „Esperanto en propagando de ĉsl. leturismo“, por kiu ni preparos materialon kaj eble ankaŭ belan landkarton de la respubliko kun punktoj de lokoj, kie troviĝas esp-istoj donantaj informojn pri ĈSR (delegitoj, kluboj k. s.).

Estas nepre necese, ke la samideanoj, kiuj intencas partopreni, anoncu sin kiel eble plej baldaŭ (plej bone tuj) ĉe la Esperantista Klubo Dr. Schulhof en Pardubice. Legitimacio, kiu kostas 21 Kč, rajtigas

1. ricevi 33% rabaton fervojan (en persona aŭ rapida vagonaro),
2. dufoje en la sama tago viziti la ekspozicion,
3. postuli loĝejon (indiku, ĉu vi deziras hotelon, privata loĝejon aŭ komunan dormejon en lernejo). Pri la prezoj furnu vin direkte al E. Kl. Pardubice.

Jam la ekspozicio mem de la Korpa eduko kaj Sporto meritas la viziton. Sed krome, ni esperantistoj uzu la okazon de la rabatita fervojkosto por denove post longa tempo kunveni por amika interparolo kaj por iom da amuzo en rondo esperantista. La orienta Bohemio kaj la okcidenta Moravio jam delonge ne okazigis regionan kunvenon. Ni profitu la bonvolon de E. Kl. Pardubice. Estas nun multe da aferoj „en la aero“, kiujn ni povas pridebati. Sed ĉefa afero: baldaŭ aliĝi, por ke Pardubicianoj povu plene vin kontentigi (per loĝigo kaj programo).

S-ro Scherer venos en Oktobro.

Laŭ la provizora programo, kiun ni ricevis de I.C.K. en Genève, S-ro Scherer restos en nia lando 12 tagojn, de 19.—31. Oktobro. Ĝis nun pri sia intereso informis Asocion kluboj en Praha, Kládnno, Brno, Bratislava kaj Košice. S-ro Scherer faros esperantajn paroladojn laŭ tre interesaj temoj pri Kalifornio, filmurbo Hollywood, sia vojaĝo tra la malproksima oriento, por honorario 10 usonaj dolaroj t. e. ĉ. 350 Kč, minimume. Paroladoj pri esp-aj temoj senpagaj por la kluboj, kiuj aranĝas publikan paroladon. Detaloin kaj liston de la temoj sendos laŭdezire la Asocio.

Ni rekomendas, ke la kluboj kaptu tiun ĉi eblecon por plivigliĝi la intereson de siaj membroj kaj por prezenti al la publiko de sia urbo interesan paroladon (kun lumbildoj). Tradukon nacilingven certe iu el la klubanoj volonte faros.

Por povi fari la definitivajn programon estas necese, ke pluaj kluboj sendu al ni siajn aliĝojn por la Scherer-parolado antaŭ la 15. Majo.

Neveraj informoj en BES-a adresaro.

La komitato de CAE konstatas kun indigno la manieron, laŭ kiu Inĝ. L. Berger en Portejn-Dymokury en sia BES-a adresaro esprimas sian personan malamikecon al funkciuloj de CAE kaj al CAE mem. La komitato bedaŭras, ke sekve de tiu ĉi neserioza redakto, ĝi ne povas rekomendi aĉeton de tiu ĉi adresaro.

Kursoj por kandidatoj de esp. ekzamenoj.

S-ro Baroch, Praha, proponis ke ni aranĝu kurson por tiuj esperantistoj, kiuj volus perfektigi en scio de la lingvo kaj en kono

de la movado, en scio de la pedagogio kaj lernejoj, por fari la ŝtatan ekzamenon de esp-o. Ni prezentas tiun proponon, kiu laŭinforme estas subtenata de cca 20 interesuloj, al la ekzamenaj komisarioj en Praha, Brno kaj Bratislava.

Danoj dankas al CAE.

La redakcio de La Progreso ricevis la jenan leteron:

„Bonvolu publikigi en via gazeto sekvantan dankon al niaj ĉeĥoslovakaj samideanoj:

Societo de Danaj Esperantistoj deziras esprimi sian plej koran dankon pro la bonega kaj energia laboro farita okaze de la rondirado de nia Danlanda filmo en Ĉeĥoslovakujo. Al via speciala reprezentanto, kun kiu ni interlaboris, S-ro Ginz, ni esprimas nian sinceran dankon pro la freege kontentiga laboro, kiun li faris, ĉiam precize kaj rapide, tiel ke ni de la unua momento sentis, ke la afero estis en la plej bonaj manoj.

La rezultato fariĝis en via lando ĉe pli sukcesa, ol ni atendis; multaj samideanoj kunhelpis, al ili ni ne persone povas danki, sed petas ilin ricevi ope nian dankon.

Nia espero estas duobla, unue, ke nia filmo kiel vivanta pruvo de Esperanto en la praktiko fariĝis bona propagando por nia komuna afero kaj due, ke viaj samlandanoj sentas inklinton viziti nian landon aŭ pli intime konatiĝi kun ĝi.

En la nomo de

Societo de Danaj Esperantistoj

Margarette Noll,

Prez.

Dana filmo en Hradec Králové.

Esperantista klubo projekciis la filmon en Lidobio dimanĉe matene la 22. Marto. Partoprenis 503 p. Estis necese starigi duan kason, ĉar la kutima kaso ne sufiĉis por vendi biletojn al la grandaj amasoj de la vizitantoj, kiuj venis lastminute. La filmo tre plaĉis kaj ankaŭ la propaganda rezulto por esperanto donas multajn esperojn.

Ĉar la GEL ne respondis nian demandon, ĉu ili deziras ankaŭ uzi la filmon, ni forsendis ĝin eksprese al Amsterdam la 23. Marto.

El Teplice petis la filmon prof. Murath, sed lia karto sendita ne senpere al ni, sed al privata samideanino, kiu estas malsana, malfruiĝis.

Diversa:

Ekspozicio Louny. Laŭ instigo de S-ro Haman el Hnidousy ni traktos kun E. Kl. Kladno pri ebleco aranĝi en Louny esperanto-ekspozicion, por kiu ni pruntus materialon. Propagando tie estas rekomendinda, ĉar la regiono estas malmulte esperantigita.

Informado de eksterlandaj kunlaborantoj. Per sendo de la koncernaj nroj de La Progreso ni informis Hungaran Skoltan Esp-o Rondon en Budapeŝt kaj Int. Esperanto-Muzeon en Vien pri niaj decidoj kaj aranĝoj koncernantaj ilian agadsferon.

Ĉsl. Antologio. La leteroj pri kunlaboro estis dissenditaj. Jam venis kelkaj respondoj.

Studentan Sekcion ĉe Asocio fondí proponas Samospráva Masarykovy studentské koleje Praha. La simpatia propono estos prezentita al la jarkunveno de CAE.

Listo de esperanto-oratoroj. La kleriga societo Masarykúv lidovýchný ústav (Osvětový Svaz) eldonis nomaron de oratoroj pri diversaj temoj. En ĝi estas ankaŭ nomoj de dir. Krumpholtz, Neužil, Dro Pítlík, kaj F-ino Šupichová, kiuj havas temojn priesperantajn. Ti instigas nin fari mem liston de tiaj oratoroj inter niaj membroj, kaj ni petas la respektivajn personojn, ke ili afable informu nin pri la temo de la parolado, kiun ili povus prezenti (ĉu ĝenerale pri esp-o, ĉu speciale pri espo kaj iu fako k. s.) kaj pri la kondiĉoj (honorario, rekompenco de elspejoj). Ofte ni estas ankaŭ petataj informi pri personoj kapablaj kaj pretaj gvidi kurson. Estus tre utile kaj en la intereso de la kursestroj mem, se Asocio havus nomaron de ili. Bonvolu do enskribiĝi ĉe Asocio.

Rabato por vojaĝo al Krakova kongreso. Ni informiĝis pri diversaj eblecoj kaj donos detalan informon en la venonta nro.

La venonta komitatita kunveno okazos la 15. aŭ 16. Aprilo, ĝis kiu dato estas akceptataj proponoj por la jarkunveno.

R. H.

GRAMOFONA DISKO KUN LA „ESPERO“.

La gramofona disko kun la esperanta himno, maistre kantata de la Bakule-floro, estas jam dissendata. En Ĉeĥoslovakio ĝin liveras la Instituto de Bakule afrankite post antaŭa pago de 30 Kč, kiujn bonvolu sendi per poŝta blankopagilo (havebla en ĉiu poŝtofiĉejo por 5 h) al konto nro 207,384 Praha, „Bakulova družina, Praha—Smíchov“.

La disko enhavas la „Esperon“ kaj ĉefan Skoltan himnon, sur dua flanko la Himnon de Ruĝkruca junularo kantatan ĉefie, france kaj angle. Estis ankaŭ eldonita disko, kie la angla lingvo estas anstataŭita per lingvo germana. En via mendo, kiun faru simple per la pagilo, bonvolu noti, kiun diskon vi deziras.


Z ESPERANTSKÉHO SVĚTA


Zamenhofovo náměstí. Náměstí před nádražím v Boulogne-sur-Mer nazváno podle rozhodnutí městské rady náměstím Zamenhofovým. Autor esperanta doktor Zamenhof dlel v Boulogni r. 1905, když se tam konal první světový kongres esperantský.

Zločinci z povolání jest dílo vynikajícího odborníka Josefa Vávrovského, vrchního četnického strážmistra, jenž v něm předkládá výsledky své dlouholeté zkušenosti a odborného studia. Knika málo stran jest pouťavě psaná, i když mluví někdy o předmětech málo vábných, jež její titul naznačuje. Obzvláště zajímavá jest část věnovaná mezinárodní součinnosti v zájmu bezpečnostní služby. Autor v ní zdůrazňuje potřebu snadného prostředku k společnému dorozumívání a píše obšírně o esperantu, jehož jest k tomu účelu zhusta používáno.

Bakulova družina zpívá esperantsky. Slavní Bakulovi zpěváci přednášejí při svých zájezdech do ciziny často jako první bod programu esperantskou hymnu. Melodickou tuťu píseň nazpívali nyní také na gramofonovou desku, o kterouž se jeví velký zájem mezi nesčetnými přáteli esperanta a Bakulovy družiny v mnoha zemích. Bakulův sbor zpíval při různých příležitostech s velkým úspěchem i jiné esperantské písně.

Kronikon de la movado en ĈSR la Bulteno alportos en sia venonta nro.

ĈSL. TISK A ESPERANTO.

Profesor J. Velenovský a esperanto. V 1. čís. VIII. ročníku časopisu *Mykologia* uveřejňuje slavný čl. botanik J. Velenovský článek „Vědecký jazyk (*lingua scientiarum naturalium*)“, v kterém doporučuje za pomocný jazyk latinu, ačkoliv nedovede vysvětlití fakt nesporně empirický, že latina jako pomocný jazyk byla opuštěna. To by konečně ani nerozčílovalo, takových věcí musíme přechítí celou řadu a nestojí za námahu ani o nich vypravovatí, natož psátí. Co však pobuřuje u muže ozdobeného nejvyššími akademickými řády a tituly, je smělost, s jakou hovoří o věcech, o nichž si neopatřil žádných informací. Tvrdí totiž, že esperanto může se hodit pouze k potřebě hotelových turistů, ale nikdy k sdělování myšlenek kultivovaných myslitelů nebo složitých citů. Zatím každý, kdo se o našem hnutí jen trochu informoval, musí konstatovatí fakt, jistě překvapující a neočekávaný, ale fakt, že esperanta neužívá se právě v řeči hotelových portýrů, ale dosud hlavně, často skoro výhradně, k propagaci myšlenek abstraktních a složitých. Je trapné, že prominentní zastupce přírodních věd jest ochoten básnití o věcech, o kterých mu chybí i malá znalost fakt. Věc je smutná, bohužel není překvapující.

Dr. Stan. Kamaryt.

Papiamento je nejsnadnější živá řeč, prý, podle prof. pedagóg. ústavu v Chile R. Lenze. Mluví jí černoši na ostrově Curacao, 95 proc. všech slov jsou původu španělsko-portugalského a zbytek holandského; pouze jedno slovo je původu afrického. Papiamento nemá ani skloňování ani časování a vše se v něm vyslovuje tak jak se píše. Esperanto je prý mnohem těžší. (*Národní Politika* z 12. 3. 31.)

Věstník pedagogický, Praha, 24. 2. 31 uveřejňuje zprávičku o usnesení berlínského magistrátu zavéstí esperanto do tamějších škol. Učitelům budou hodiny esperanta počítány do povinného počtu vyučovacích hodin.

Texas, Texas, USA, otiskují v čísle z 1. I. 1931 článek Ing. Rud. Nováka z Plzně: Je potřebí jednotného jazyka mezinárodního, vyšší v Nové Práci, Praha.

Škola měšťanská, Praha, z 25. 2. 31, uveřejňuje informace o obsahu 11. a 12. č. *Internacia Pedagogia Revuo* (od Eš=Julie Šupichová). Toto číslo je doplněno bezplatnou přílohou „Seznam adres učitelů a žáků, kteří si chtějí dopisovat esperantem“. Vydává jí „Ko-

respondenční kancelář“ v Lipsku. Mezi dětskými adresami zaujmou přihlášky dětí z Laponska. I jejich učitelé hledají esperantem ve světě přátele.

Obchodní Komora, Plzeň, v č. z 15. III. 31 přináší zprávu o zasedání výboru Mezinárodní obchodní komory dne 20. února 1931 v Paříži. Mezi jinými body čtete: „Předseda pařížské obchodní komory Baudet přednesl poté zprávu o šířícím se používání Esperanta v obchodních stycích mezinárodních a žádal, aby M. O. K. je podporovala. Pařížská obch. komora byla zmocněna dáti účastníkům kongresu ve Washingtoně individuálně k dispozici propagační materiál.“

Nové Časy, Bystřice p. Hostýnem. V čísle z 13. 3. 31 nacházíme Esperantskou hlídku (o klubu katol. esp. v Brně a o novém klubu ve Vítkovicích).

Ruch, Brno, který nyní vychází týdně, uveřejňuje 4. I. 1931 esperantskou prózu Jarosl. Hladkého: *Jaro — libro*.

Malý zpravodaj dětského světa a Mladý svět, Praha, pokračují v uveřejňování esper. kursu sl. Šupichové.

Spravedlnost, Chicago, mají 5. XII., 9. I. a 6. II. zprávy o esp. hnutí ve Spojených státech a náš článek Esperanto ke zvýšení cizineckého ruchu.

New-Yorské Listy, City N. Y., ze 17. XII. 1930 otiskují článek slč. Šupichové, který vyšel v N. P.

Nový Směr, Moravská Ostrava, otiskuje v esperantu na několika sloupcích vyprávění J. A. F. Vítka: *Mia vojaĝo en Svedlandon kaj Danlandon*.

Pedagogické rozhledy, Praha, č. 2.: Esperanto je povinným předmětem na vysoké škole obchodní v Riu de Janeiru. — Kursy esperanta konají se v Americe na dvaceti vysokých školách. — Rumunský ministr vyučování doporučí ředitelstvím středních škol zřizovatí kursy esperanta pro žactvo i dospělé. — Na pedagogickém institutu v Drážďanech je esperanto volitelným předmětem.

Rozkvět, Praha, ilustráta gazeto, alportas la 14. III. 1931 ĉefan tradukon (de O. Ginz) de la rakonto Frosto, kiun en la finna lingvo verkis Suonio, kaj kiu en esperanto aperis en la VII. jk. de La Progreso.

INTERNACIA LIBERTEMPEJO EN LAZNĚ BĚLOHRAD SOMERO 1931.

Pri la entrepreno interesigas jenaj samideanoj el eksterlando, kelkaj el ili en nomo de pluraj personoj:

s-ro Hans Sievers, eksministro Braunschweig, Germanio,

s-ro E. Markau, Potsdam, Germanio,

f-ino Rahel Mizes, Brzeziny-Lódzkie, Polujo,

f-ino F. M. Bartholomen, delegito de UEA, Lethworth, Britlando,

s-ro Kovarcz S. Károly, Budapest, Hungarujo,

s-ro Ludoviko Siedl, kalkulkonsilanto, wien, Aŭstrio,

s-ro R. Raven-Hart, Herblay, Britlando.

La eldono de la gvidlibreto prokrastiĝis pro teknikaj kaŭzoj. Ĝi certe aperos en fino de aprilo kaj ni petas paciencon de la interesantoj. — Ni ripetas venu nur tiu, kiu volas pasigi frankvilan tempon en amika, esperantista societo, for de la monda bruoj. Tamen komforto necesa ne mankos. Ni zorgos, ke ĉiu el la venontoj estu individue prizorgata. Al ĉies deziroj ni individue respondos kaj estos nia honora devo kontentigi ĉiujn. La prezoj estas akcepteblaj por ĉiu, do venu, kiu povas. — La internacia Ce-Instituto ne respondis ĝis nun je nia demando, ĉu estus aranĝebla Ce-kurso dum Julio aŭ Aŭgusto. Ni esperas povi en la venonta numero doni finan rezulton en tiu ĉi punkto. La gvidlibreton ni tuj post apero ekspedos al ĉiuj, kiuj petis ĝin.

Teritoria Oficejo de UEA
Hradec Králové 628-a.

LEGORONDOJ.

Multaj niaj samideanoj dezirus legi esperantajn librojn, precipe la novajn, inter kiuj troviĝas tiom da interesa legaĵo. Sed ne ĉiuj, kiuj deziras legi, havas monon por aĉeti. En tiu punkto estas bone prizorgataj membroj de la lokaj kluboj, kompreneble sole en la okazo, ke ilia estraro havas komprenon por la kluba biblioteko. Sed kiel sin helpu precipe la izoluloj, da kiuj en nia lando estas multe, kaj inter kiuj ĝuste estas multe da personoj havantaj seriozan intereson pri la lingvo kaj ĝia literaturo?

Al tiuj ni prezentas interesan sugeston, kiun ni trovas en sveda gazeto La Espero: krei legorondojn. Ekz. dek personoj dezirantaj legi, ni diru, la libron En okcidento nenio nova, kiu kostas ĉ. 50 Kĉ pagas al unu el ili — kasestro — po 5 Kĉ. La aĉetita libro rondiras de unu membro de la legorondo al alia. En du tri monatoj ĉiuj legis la libron. Intertempe por nova kotizo estas aĉetata nova libro. Tiamaniere por la 50 Kĉ la legorondanoj povas legi 10 librojn en aĉeta valoro 500 Kĉ. Kaj kion fari kun la tralegitaj libroj? Lote doni ilin inter la membrojn, ekzemple. Ĉiukaze, eĉ se ni enkalkulas la poŝtelspezojn, tia legorondo povas esti utila afero. — Ni mem estas pretaj faciligi la aĉeton kaj la funkciadon, se inter niaj legantoj troviĝos sufiĉa intereso. — Bonvolu vin turni al ni.

LIBERA TRIBUNO.

Esperantistaj kokoj.

Tiu artikolo en la lasta kajero de pasintjara kolekto de Progreso, enhavas bedaŭrinde multe da vero. Ĉiuj niaj organizoj, kaj la movado mem, povus esti multe pli fortaj, se ni ne havus tiom da „kokoj“! Ĉiu el la „kokoj“ havas iajn kapablojn, kiuj estus al la movado dekfoje pli utilaj, se ili estus utiligataj de niaj centraj organizoj! Sed kompreneble, bona volo devus esti unue ĉe la kokoj mem. Ĉu ili ne sentas neceson de kunlaboro kun la centroj kiuj estas ĉiam unue: loka grupo, poste CAE, kaj UEA. Serĉu la vojon komune ireblan, Konformiĝu al la plimulto! Ĉu vi scias kiel aspektas nune nia movado en ĈSR? Jen la triversaĵo respondos Vin:

Unu esperantisto — LABORO.

Du esperantistoj — KLUBO.

Tri esperantistoj — DU KLUBOJ!

... bedaŭrinde sed vere. Ĉu Vi, Vi kiuj staras apartiĝinte, ĉu vi ne sentas kulpon de tiu ĉi stato? Fermu Viajn butikojn, kiuj pli malutilas ol ili estas utilaj! Fermu ilin kaj samforte subtenu entreprenojn de loka grupo, de CAE, kaj de UEA. Tiel ni venkos kaj ne, se ni laboros ĉiu aparte, laŭ siaj eĉ tre bonaj intencoj. En nia movado mankas disciplino! Vi sinjoroj, kiuj estis nomataj en la artikolo pri la E. kokoj, donu bonan ekzemplon al la ceteraj! Estu la unuaj!*)

Sustr.

*) Aliajn respondojn al Nulo ni publikigos venonte.

S-RO JOHN MERCHANT,

prez. de ICK. kaj BEA.

PRI LA TRADUKO DE LA LIBRO DE JAN
WELZEL: NA ZLATĚM SEVERU.*)

(EN ORA NORDO.)

(El lia letero.)

Sed mi devas aludi la verkon mem. Kiam miaj okuloj unue vidis la grandan manuskripton, kiun Vi tiel afable sendis al mi por tralegado, mi tuj sentis, ke mankos al mi la tempo por senprokraste legi la tuton. Tamen, mi sidigis kaj komencis la ŝajne grandan taskon, sed antaŭ ol mi finlegis la Antaŭparolon, mi konvinkigis, ke mi havas en la mano tute neordinaran literaturajon. La antaŭparolo elvekis ĉe mi grandan intereson... neniun verkaĵo havis jam pli bonan prezentadon al la leganto. La sentoj pri ebla enuigo tuj malaperis kaj mi legis kaj legis senhalte, ĝis mi englutis la tutan rakonton pri la vere mirindaj aventuroj de sro Jan Welzl en Ora Nordo. Komprenoble mi ne kapablas juĝi la verecon de la tradukado, sed mi povas konstati, ke la verkaĵo en sia esperanto-vestaro estas unu el la plej interes-kaptantaj kiujn mi iam legis... ne nur en la internacia lingvo, sed en ia lingvo. Ni angloj kutimas legi librojn pri la aventuroj de famaj esploristoj kaj vojaĝistoj, kaj mi mem multe ŝatas tiun specon de literaturo kaj grandan sperton pri ili. Sed ĉi tiu verkaĵo meritas lokon inter la plej bonaj el ili.

La kopio ne mencias la nomon de la tradukanto aŭ de tradukantoj, sed mi deziras gratuli ĉiujn, kiuj estas respondaj por la belega stilo... la fakto ke mi legis la tutan verkon senhalte... ĉar mi ne povis lasi la legadon kaj enlitiĝi antaŭ ol mi alvenis al la lasta paĝo... estas vera pruvo de la flueco de la traduko. Oni malofte renkontas nekonatan vorton... eble ne pli ol ses en la tuta manuskripto kaj la beleco de la frazoj ofte elvokas admiron...

Mi estas certa ke la verko prenos sian propran lokon kiel unu el la plej grandaj sukcesoj kaj kiel unu el la plej valoraj literaturajoj en nia ĉiam kreskanta biblioteko de trezoroj. Mi esperas ke la ŝatata entrepreno de Via societo ricevos la rekompencan, kiun ĝi tiel bone meritas kaj mi estas treege fiera, ke vi intencas kunigi mian nomon kun tiu ĉi epok-faranta eldono.

John Merchant
(subskribita).

NASKIĜO.

Al la geedzoj Jaroslav kaj A. Sustr, prez. de E. Klubo Praha, naskiĝis filo nomita Jaroslav, kiu fariĝis membro de UEA kaj estas do nun la plej juna UEA-ano. Multe da sano al la filo kaj da kontento al la gepatroj!

DIVERSAJ INFORMOJ.

Flandra kongreso de Esperanto okazos dum Pentekosto en Aalst. Fervoja rabato 35%. Aliĝoj ĉe la komitato Aalst, Erembodegemstraat 29.

Propagando-afiŝon modernan, belaspektan (terglobo, verda stelo, vorto Esperanto) eldonis Heroldo de Esperanto. Sufiĉe da loko por alpresajoj. 61×90 cm po ekz. gmk 0.50, 10 ekz. gmk 4.—; 30×45 po ekz. gmk 0.35, 10 ekz. gmk 3.—.

Traduko de la 27 teksto aperos venonte. Vian tradukon vi povas ankoraŭ sendi ĝis 19. Aprilo.

P. V. ŭst. Kosmonosy. Abono 1931 pagita. Dankon.

Adresoj de korespondantoj laŭ nia promeso en la lasta n-ro estas sendataj laŭdezure al niaj abonintoj, ne al iu alia. La demandoj venintaj estas respondataj sinsekve. Bv. pacienciĝi.

Librojn ekspedi, resp. ekspedigi ni povas nur, kiam ni ricevos la monon. Uzu la bianco-pagilojn de la Poŝta ŝparkaso.

Slovník obchodně-technický, účetní a daňový. Sešit čís. 25—27 (III.) obsahuje: Holandské bankovníctví — Hole — Holičství — Holubi — Honitba — Hornictví — Hospodářské stroje — Hostinství — Hotely — Hotovost pokladni. Vydávají Tiskové podniky ú. S. Č. P., Praha I., Masarykovo nábřeží 4. Cena sešitu Kč 19.50.

Hermann Haefker:

JARMILOJ PASAS

Universala mondhistorio, en du volumoj.

Originalo en Esperanto

11 geografiaj karto, 6 artaj reproduktajoj
I, vol. 245 p.

Duonlede bindita 80 Kč afrankite.

* La libron eldonos post nelonge Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Vidu lastan n-ron.

Korekto. Sur p. 4, maldekstre, la 15. linion streku kaj anstataŭu per „mi povu preni vin kiel edzinon?“ La sama paĝo, l. 30, legu: „brilumatajn“; l. 15. ms. „Odiseadon“.

Recenzojn ni devis prokrastigi por la venonta numero.

Ni dankas

al ĉiuj, kiuj esprimis al ni sian kontenton pro la riĉa enhavo de la 1—2 nro,

al ĉiuj, kiuj jam sendis la abonon,

al ĉiuj, kiuj sekvis nian peton kaj varbis novan abonanton.

BES-a adresaro de esperantistoj el ĉiuj landoj, 9. eldono, 1931, p. 80 + 20. Bele aspektanta kaj praktike aranĝita helpilo por korespondemuloj. La enhavo malpli plaĉa. Ni ne povas fidi la indikojn el fremdaj landoj, vidante, ke la informoj el ĈSR estas nekompletaj (mankas ekz. ekzistanta Progreso), malnovaj (ekz. Klubo de Praha jam la pasintan jaron ŝanĝis sian adreson), neveraj (ĝenerala sekr. de ĈAE espereble vivos pli longe ol daŭros lia funkcio). Nomi ĈAE „germanema“ ne apartenas en la adresaron, kiu ne estas loko por brili per tiaj subjektivaj rimarkoj, precipe se Ing. Berger havas du gazetojn, kiuj laŭ la anonco en la adresaro aperas. Mankas ankaŭ UEA. Ĉio ĉi estas des pli bedaŭrinda, ju pli memfida estas la aŭtoro en la antaŭparolo: „verama informanto pri l' tuta Esperantujo kaj pri ĉiuj esp-istoj, ne sole pri delegitoj de ia asocio...“ Komike aspektas, kiam la redaktoro, kiu tiom akre kritikis la neregulan aperadon de la monata Progreso, aperigas malfrue publikajon por kies redaktoro li havas tutan jaron.

rh

Slovníky:

- Kühnl-Procházka**: Slovník česko-esper., váz. Jediný, česko-esp. slovník, 25.000 slov (nová cena) 30.—
- Čánský-Riedl**: Slovník esper.-český. Obsáhlý, mnoho slov, i odborných 21.—
- Filip Jan**: Velký slovník esper.-český. Obsáhlý, mnoho odvozenin 40.—, váz. 50.—
- Hromada-Petr**: Slovník esper.-český. Obsahuje na 5.500 slov. 2. vydání se připravuje rozebr.

NECHUŤ K NOVOTAM

ĉili o tom, jak skeptické prorokování konservativců se často neosvědčí.

Ve světě náboženském, vědeckém, politickém a sociálním všude vidíme kolem sebe lidi, kteří z rozumové pýchy tak vězí ve svých představách a předsudcích, že jsou nepřístupni zjevení dokonalejší pravdy. Místo aby mohutněli, zakrňují, zvrhají se a pozbývají schopnosti chápat pravdu. Místo, aby přispívali činně k pokroku světa, podobají se suchým větvím ležícím v cestě a zdržujícím kola pokroku. Ale zdržení jich nemohou. Bývají vždy rychle rozdrčeny, přelámány a opuštěny, a triumfální vůz pravdy spěje bez překážky ku předu.

Když byly ještě konány pokusy s parostrojem, a dříve než byl zdokonalen pro praktickou potřebu, napsal anglický učenec na slovo vzatý, obšírný hanopis, v němž dokazoval, že nikdy nebude možno parolodí přeplouti moře, poněvadž prý loď nikdy neuveze dosti uhlí pro vytápění kotlů. A je zajímavé, že první parník, který konal cestu z Anglie do Ameriky, měl mezi svým nákladem část prvního vydání tohoto důkladného pamfletu. Druhé vydání ostatně již nevyšlo.

Událostí památnou bylo, když se začalo se stavbou železnice z Brna do Vídně (roku 1839). Nechyběli kritikové skeptici. Především se jim zdálo, že je zapřáhání ohně do tahu počínání nejen hříšné, ale i nebezpečné. Jaká neštěstí z toho mohou povstat, kolik prý bude v Brně a v okolních vesnicích požárů, co se spálí úrody na polích atd., všechno to bylo probíráno velmi důkladně. Rokováno o tom, jaké nebezpečí to bude pro cestující, pojedou-li takovou ohromnou rychlostí krajinou. Vždyť se tvrdilo, že takový vlak pojedě — počítáno podle dnešních měr — až 15 kilometrů za hodinu. Závratí, ošlepnutí cestujících i diváků, splašení koně a dobytek, ořesy budov, zkrátka nebezpečí nad nebezpečí — a císař pán to rozhodně neměl dovolit. A pak je to vůbec nesmysl. Vždyť každý ví, co stojí ročně udržování silnic. Kdepak se seženou peníze na to, aby se po celém světě kladly železné kolejnice. A jak pak je budou udržovat, vždyť to bude všechno rychle rezavět. Nikdy se to nemůže vyplatit, bude to stát miliony a miliony ročně — a vůbec, žádný rozumný člověk si do toho přece nesedne.

Směšné jsou tyto dva příběhy. Leč mnohem směšnější je člověk, který se vědomě uzavírá pravdě, poněvadž nepřichází cestou obvyklou, pravověrnou, nebo dosud uznávanou, a protože se snad neshoduje s platnými zvyky a věrami nebo se jím přičí.

(Podle různých pramenů R. F.)

Umožněte nám včasné vycházení
včasným zasláním předplatného.

Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze čís. 238.888/VI-25.

Eldonanto kaj responda redaktoro RUDOLF HROMADA. - Presis JAN MINAŘ NYMBURK.